

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgo
Ernest Archdeacon, Paris
I. Gili Norita, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 198
29. 6. 1924

Redakcio:
Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kraus.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:
Horrem b. K8ln, Germanlando

Abonprezo
po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,20 sv. fl., por landoj, kies valuto
sufiĉas maksimume 80%; por ĉiuj aliaj
landoj 0,06 dol. aŭ 0,25 sv. fl.

Anonprezo
po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fl. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fl.),
es „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgo, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La Brita Asocio por la Progresigo de la Scienco por Esperanto!

Favora decido de l' kleriga ministerio de tatara respubliko. — Dekreto de l' prusa ministro por Esperanto en mezlernejoj.

XI. Kongreso de „Kataluna Esp. Federacio“ kaj X. Internaciaj Floraj Ludoj

Vich (Katalunujo) 8-10 Jun. 1924.

Kun la plej granda sukceso okazis la Kataluna Kongreso kaj la Internaciaj Floraj Ludoj. Tricent kongresanoj alveturis la urbon Vich el pli ol 30 katalunaj urboj kaj vilaĝoj. La Floraj Ludoj okazis en vasta teatro antaŭ 2.000 ĉeestantoj. Okaze de la kongreso, la urbestro ornamis la urbon per verdaj flagoj kaj starigis belan monumenton alegorian pri la paco. La ĵurnaloj de Vich tre favore raportis pri la esperantaj faktoj kaj eĉ unu el ili, la „Gazeta de Vich“, aperigis gravan artikolon por Esperanto, de la kataluna verkisto Jaume Collell.

Alveno de la kongresanoj. La dimanĉon tagmeze alvenis la kongresanoj. Ilin atendis ĉe la stacidomo la urbaj aŭtoritatoj, la Organiza Komitato kaj la loka samideano. De la stacio oni demonstracie iris, kun 11 standardoj de la esp. grupoj, ĝis la urbdomo, kie la urbestro bonvenigis la esperantistojn. Ankaŭ salutis ilin la delegito de la Militista Direktorio. Dankante ilin respondis s-ano Delfi Dalmau.

Malferma kunsido. S-o Jaume Grau Casas, sekretario de la kongreso, legis la prezidantan paroladon de s-o Joan Amades. Salutis kongresanojn delegitoj de 16 grupoj, s-o Jacinto Bremón, lingvokomitatano, s-oj Maynar kaj Gastón el Zaragoza kaj s-o Barceló el Palma de Mallorca. Fine parolis la prezidanto de la O. K., s-o Jacinto Cornella, kiun oni salutis per ovacio por danki ilin esperantistojn fervoron. Estis legatitaj multaj aligoj literaj kaj telegramaj.

Kongresaj libro kaj insigno. Ĉe la eliro el la malferma kunsido estis disdonataj la kongresinsigno el bronzo kun la busto de nia Mastro kaj la kongreslibro, enhavanta ĉiun informojn kaj 30 gravuraĵojn kaj du planojn de Vich. Tiuj libro, presita sur luksa papero, estas redaktita en lingvoj Esperanto kaj kataluna.

Propaganda ekspozicio. Je la 4 horo estis solene malfermata ĉe „Temple Romà“ la esperanta ekspozicio. Poste oni vizitis la katedralon, la tombon de la filozofo Balmes kaj la Arkeologian Muzeon.

Koncerto. „La Espero“ kantata kvinvoĉe de 230 orfeonistoj. Ĉe la „Teatro“ de Vich okazis grava muzika festo. Unue estis ludataj piano, violino kaj violonĉelo muzikaĵoj de Haydn kaj Granados. Due s-ano Palmaria Castellvi kantis kelkajn popolkantojn el diversaj landoj, la „Neŭtila Serenado“ de Brahms, la „Edziĝo de Figaro“ de Mozart kaj la „Reĝo de la elfoj“ de Schubert, ĉiujn en Esperanto. Trie infana fako de la „Orfeo Vigatà“ prezentis kantojn kun gestoj kaj ritman gimnastikon de katalunaj aŭtoroj kaj de la fama Jacques-Dalcroze. Kvare, la tuta Orfeono kantis kelkajn kantojn katalunaj kaj fine „La Espero“. Ĝi estis ripetata, kantata de la Orfeono kaj kongresanoj samtempe. — Antaŭ la koncerto estis disdonita bela programo kun la tekstoj de la esperantaj muzikaĵoj.



La kongreso en Vich.
Eliro de la samideanoj el la stacidomo.

Versaĵo, premiita por la Natura Floro.
KISOJ.

Mi kisas vian manon:
Patrinon kiel fil'.
Estim'. Respekto pia.
Humil'.

Jen kis' al viaj haroj:
De patr' al filin'.
Dorlot'. Fier' naiva.
Kvief'.

Mi kisas vian frunton:
Fratinon kisas frat'.
Fidela ŝirm' kareso.
Kaj flar'.

Jen kis' al via vango:
El kamarada kor'.
Komunaj zorgoj. Ŝercoj.
Humor'.

Mi kisas vian buŝon:
Mallumo. Fulm'! Destin'.
Turmento! Rav'! Komenco
Kaj fin'!

Kolomano de Kalocsay.

Honora vermo kaj labora kunsido. Ĉe „Katolika Junularo“ oni regulis la kongresanojn per vermo. Post la vespermango okazis ĉe la urbdomo la labora kunsido, en kiu oni preparis la aferojn de la Kataluna Federacio. Inter alie oni decidis saluti telegrafe s-on Cart, prezidanto de la Akademio, kies malsaneco malebligis al li plenumi la taskon de prezidanto de la Floraj Ludoj. Oni elektis kiel venantan kongresurbon Palma de Mallorca, ĉefurbo de la Balearaj Insuloj. Oni sciigis, ke la Kataluna Federacio jam pagis 300 kolizaĵojn al la konstanta reprezentantaro.

Diservo kun esperanta prediko. Lunde, je la 9 horo matene, okazis ĉe preĝejo „L' Escorial“ esperanta diservo kun prediko de Pastro Casanovas el Girona. Kantis la meson la „Orfeono“ de Vich.

Festo de la Floraj Ludoj. En la teatro de Vich, solene ornamita, okazis la hela Festo de la Poezio. La urbestro elparolis la ritan frazon „La festo komenciĝis“, post kiam la sekretario de la ĵugantaro de la X-aj Internaciaj Floraj Ludoj, s-o Jaume Grau Casas, eklegis sian raporton. Li vokis

la nomon de la eminenta poeto Kolomano de Kalocsay el Budapeŝto kiel ĝajninton de la plej honora premio, la Natura Floro, kaj iris ricevi ĝin el manoj de la urbestro s-ano Delfi Dalmau, reprezentanto de la laŭreata poeto. Meze de ovacio li iris proponi ĝin al la Reĝino de la festo, la belega fraŭlino Montserrat Terricabras Fatjo, kiu eniris la salonegon kun sia kortego de Amo, konsistanta el dekunu ĉarmaj fraŭlinoj kaj du paĝoj, dum muzikistaro ludis triumfan marŝon kaj la multnombra publiko starante salutis per tondra aplaŭdado. Poste s-o Dalmau bele deklamis la versaĵon de K. de Kalocsay, „Kisoj“, kiu meritis la Naturan Floron. Poste estis alvokataj ĉiuj premiitoj aŭ iliaj reprezentantoj, kaj estis legatitaj kelkaj aliaj poeziaĵoj. En la nunjara Florluda Konkurso atingis premiojn 30 samideanoj kaj menciojn aliaj 49, el 14 landoj.

Jen la nomoj de la premiitoj:

Premiitoj:	Premiitoj:
Libroj	s-o Kolomano de Kalocsay, Hungarujo
75 pesetoj	Antoni Durà, Katalunujo
75 "	Pastro Ignasi Vinyes, Katalunujo
75 "	Josep Casanovas, Katalunujo
75 "	s-o Jakob Schmid, Svislando
100 "	Edouard Jung, Francujo
Artobiekto	s-ino Emma L. Osmond, Anglujo
50 pesetoj	s-o St. J. Felhke, Polujo
25 "	Jakobo Schmid, Svislando
25 "	Marian Solà, Katalunujo
25 "	K. de Kalocsay, Hungarujo
25 "	Wilhelm Solzbacher, Germanujo
25 "	F-lino Louise Briggs, Anglujo
50 "	s-o J. Sirjaev, Rusujo
50 "	Arturo Ghez, Italujo
50 "	H. A. Luyken, Anglujo
Kanario	Artur Domenech, Katalunujo
25 pesetoj	E. Felhke, Polujo
25 "	Adolf Hirschegg, Aŭstrio
Libroj	Bruno Migliorini, Italujo
25 pesetoj	Walter Lippmann, Germanujo
Kolbaso	Maksymilian Blassberg, Polujo
Libroj	Josep Berger, Hispanujo
50 pesetoj	Walter Lippmann, Germanujo
Libroj	Pastro Frederic Mari, Katalunujo
50 pesetoj	s-o Josep Grau Casas, Katalunujo
Libroj	Ivan H. Krestanoff, Bulgarujo
"	Christian Thoma, Germanujo
"	Ivan H. Krestanoff, Bulgarujo
"	Curt Lee, Germanujo.

Kiam la sekretario estis legita sian raporton, lia frato s-o Josep Grau Casas, L. K., sin turnis al la publiko en kataluna lingvo, glosante la gravecon de la Esp. Floraj Ludoj en la ricego de la esp. literaturo, kaj esprimante la mirindan taŭgecon de nia lingvo por ĉiuj plej altaj, literaturaj celoj. Poste parolis s-o Jacinto Bremón, L. K.-ano kaj membro de la ĵugantaro, reprezentante s-on Cart. Fine la urbestro deklaris „La Festo estas finita“ kaj la Reĝino kaj korteganinoj deiris el la scenejo akompanataj de la aŭtoritatoj kaj esperantaj pioniroj, dum ĝenerala kantado de nia himno „La Espero“.

Oficiala festeno. Ĝi okazis ĉe Kazino de Vich, prezidata de la Reĝino kaj korteganinoj, aŭtoritatoj kaj eminentaj esperantistoj. Inter aliaj parolis eĉ la urbestro, la militista delegito, la kataluna verkisto Marti Genís i Aguilar kaj la konata Barcelona komercisto s-o Banols. F-lino Castellvi kantis „La Vo'o“ kaj s-o Jaume Grau Casas deklamis sian poemon „Al la Reĝino de niaj Floraj Ludoj“.

Ferma kunsido. Post la festeno okazis la Ferma kunsido de la kongreso, dum kiu estis elektita la nova komitato de la Kataluna Fede-

racio. Poste okazis dancado de „Sardanoj“ ĉe la ĉefa placo, speciale dediĉita al la kongresanoj. Ekskursoj. Marde la kongresanoj partoprenis du ekskursojn: unu al la fama monaĥejo de Ripoll, alia al la vilaĝo Folgueroles, naskiĝloko de la nacia kataluna poeto Vergader, kie oni deklamis versojn liajn katalune kaj esperante, kaj al la pentrinda regiono „Les Guilleries“. Tiun ekskurson oni faris per ornamitaj aŭtomobiloj.

„Kometo“. Ĵurnalo de la kongreso. Dum la tri kongrestagoj aperis malgranda ĵurnalo, en lingvoj esperanta kaj kataluna, kun raportoj kaj propagandaj artikoloj.

Resumo. La XI-a el la katalunaj kongresoj atingis ankoraŭ pli grandan sukceson ol la antaŭaj. Nur la malmultaj eksterlandaj samideanoj, kiuj vizitis nin, havas ĝustan ideon pri la grandiozeco kaj beleco de niaj kongresoj, kun sia ĉefa allogo: la Floraj Ludoj. Por la venonta jaro dank' al la cirkonstanco, ke la kongresuro trovigis ĉe la Balearaj Insuloj, tre famaj el turisma vidpunkto, ni aranĝas kaj faciligos la partoprenon de esperantistaj amikoj el ĉiuj landoj.

„Kataluna Esperantisto“.

La Brita Asocio por la Progresigo de la Scienco por Esperanto!

Raporto de Komitato pri Internacia Helplingvo.

Pro manko de loko ni povas nur hodiaŭ raportoj pri tiu ĉi grava decido farita jam antaŭ kelka tempo.

La Brita Asocio antaŭ kelkaj jaroj difinis komitaton por enketi la praktikalecon de Internacia Helplingvo. Inter la membroj de la Komitato estis la jenaj konataj edukistoj: D-o H. Forster Morley (Prezidanto), D-o E. H. Tripp (Sekretario), s-o E. Bullough, Prof. J. J. Findlay, Sir Richard Gregory, s-o W. B. Hardy, D-o C. W. Kimmins, Sir E. Cooper Perry, s-o Nowell Smith, kaj s-o A. E. Twentyman.

Konsiderinte la temon de ĉiu vidpunkto, kaj aŭdinte la argumentojn de la latinistoj, la anglistoj, la idistoj, la esperantistoj, kaj aliaj, la Komitato eldonis en 1921 provizoran raporton (riceveblan ĉe la Brita Esperantista Asocio po 3 penco), kies konkludoj estas:

1. Latina lingvo estas tro malfacila.
2. La alprenado de iu ajn moderna lingvo favoras al tiu nacio kaj eksigis jaluzon nacion.
3. Tial elpensita lingvo estas plej bona. Esperanto kaj Ido estas konvenaj; sed la komitato ne sentas sin preta decidi inter ili.

De tiu dato ĝis nun la Komitato plue studis la demandojn, kaj nun raportas mallongigite fin la jenon:

La Komitato ripetas, ke de la filologia vidpunkto ĝi ne povas fari decidon. Ĝi kredas, ke la fina verdikto devas esti farata de internacia, spertega kaj aŭtoritata organizaĵo, kiu posedas ĝeneralan konfidon, kaj kiu mem studis la demandojn de ĉiu ebla vidpunkto. La Komitato tamen konscias, ke de la praktika vidpunkto decido estas bezonata, kaj tial decidis rekomendi la alprenon de Esperanto, pro tio ke Esperanto estas multe pli konata ol Ido, kaj ke la sperto montris, ke ĉe, se Esperanto ne estas tute perfekta, ĝi tamen estas tute kontentiga por ĉiu ordinara celo. Anoncante ĉi tiun rekomendon, kaj ĝis decido farigos de la senpartia internacia organizaĵo, la Komitato neniel volas malfavori aŭ senkuragigi la studon kaj eksperimentadon en ĉiu direkto, aŭ nei la pretendojn de aliaj projektoj. Sed rekomendi du aŭ pli da lingvoj egalas rekomendi neniun. Estas sufiĉe malfacile decidigi la ordinaran civitanon sin interesi pri unu formo de I. L.; peti, ke li lernu du, estus simpla malsaĝaĵo.

Brita Esperanta Asocio,
17, Hart Street, London, W. C. 1

Dekreto de l' prusa ministro por Esperanto en mezlernejoj.

Prusa ministro por Scienco,
Arto kaj Popolklerigado
U III D 906.

Berlin, 3 aprilo 1923.

Esperanto-instruado.

Ne kontraŭstaras iu konsidero, ke la reguloj de la dekreto por pli altaj lernejoj estas samsence aplikataj en mezlernejoj.

Subskribo.

Oni devas gratuli la oficialajn instituciojn de Prusio pro ilia iniciato, kiu vidigas ankaŭ al anoj de aliaj helplingvaj sistemoj, kiom oni konsideras la praktikajn sukcesojn de Esperanto. La dekreto por Esperanto en mezlernejoj de Prusio estas grava antaŭenpaŝo. Espereble seriozaj samideanoj kaj precipe instruistoj komprenos utiligi la valoran dokumenton. Mankas ankoraŭ unu paŝo: la enkonduko de Esperanto en popol-lernejoj. — Se sekvas al tiu ĉi ekzemplo aliaj federal-ŝtatoj de Germana Respubliko, la intereso de alilandaj registaroj sendube turnos sin ankaŭ al Esperanto. Ĝis la ĝenerala enkonduko de Esperanto poste ne plu estas granda vojo.

ILEPTO kaj oficialigo de Esperanto en la servo de la poŝto kaj telegrafo.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtoficistoj estas fondita en la jaro 1911. Ĝia celo estas esperantigi kaj organizi la geoficistojn, precipe ankaŭ enkonduki Esperanton en la internacian rilatojn de la poŝto kaj telegrafo. Depost 1918 ankaŭ telegrafistoj kaj telefonistoj aliĝis, tial la fako nomiĝas nun „Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝt- kaj Telegraf-Oficistoj (ILEPTO)“. La fakkunsido de ILEPTO (Nürnberg 1923) proponis kaj decidis sendi petikojn al la poŝta kaj al la telegrafa unuigo subtenataj de socialaj, administraciaj, entreprenaj kaj precipe ankaŭ geoficistaj subskriboj, kaj la III-a laborakunsido de la XV-a Internacia Esperanto-Kongreso en Nürnberg akceptis unuanime tiun ĉi agadon kun motivita rezolucio petanta la nomitajn unuigojn ke ili konsentu: „1. Permesi la uzadon de Esperanto en la internacia rilato administracia; 2. rekomendi al la geoficistoj, almenaŭ al la junaj, lerni Esperanton; 3. aldoni al la „Union postale universelle“ kaj al la „Revue télégraphique internationale“ esperantolingvan parton, aŭ eldoni apartajn mondlingvajn revuojn por la esperantista geoficistaro; 4. faciligi la vojaĝadon per esperanta afiŝo „Onis parolas en Esperanto“, aŭ verdan stelon ĉe la ĝicetoj, kie deforas esperantistoj; 5. permesi la uzadon de Esperanto kiel telegramlingvon „klarant“. Presita peticio en Esperanto kun nomigo de kelkaj gravaj internaciaj societoj estas sendita al 78 poŝtministerioj kiel avizo kaj al ĉiulandaj ILEPTO- kaj UEA-delegitoj por fari kaj sendi kune al la samaj poŝtministerioj nacilingvan tradukon kaj rekomendon. Alia, franclingva, peticio maŝine skribita kaj mane subskribita de UEA kaj ILEPTO kun rekomendaj broŝuroj estas nun ankaŭ sendita al 30 plej gravaj poŝtministerioj kaj al la Kongreso Poŝta de Stockholm mem. La mondpoŝtkongreso malfermiĝos en Stockholm la 4 de julio 1924 kaj fine de junio la pakajo kun la preskaŭ 14000 subskriboj el ĉiuj-terpartoj (35 landoj), kun statistiko estas sendota tien. Ĝis nun ĝi entenas 9910 diversajn geoficistajn, 512 societajn, 2470 entreprenajn kaj 281 administraciajn subskribojn. Ni plue petas ĉiujn esperantistajn aŭ esperantemajn redakciojn, administraciojn, societojn kaj entreprenojn ankaŭ rekte skribi leteron rekomendante la akcepton de nia petikoj al la Internacia Poŝta Kongreso en Stockholm, kunmeti rekomendilojn, ĵurnalojn k. t. p. kaj varbi por ILEPTO. Cetere ni kore invitas ĉiujn poŝt-, telegraf- kaj telefongeoficistojn aliĝi al ILEPTO, varbi por ILEPTO (iarkotizo nur 2 ĝis 3 svisajn frankojn, laŭ la valuto) kaj partopreni al nia fakkunsido dum la XVI-a Esperanto Kongreso en Vieno, aŭgusto 1924. Eventualajn subskribojn sendu tiu ankoraŭ al la subskribinto de tiu ĉi sciigo D-o Ed. Spielmann, Del. de UEA, Vicprezidanto de ILEPTO.

Tabelo pri la partopreno de div. landoj ĝis 5 junio 1924.

Lando (kontinento)	Oficistoj kaj okupitoj	Societoj	Entreprenejoj	Administracioj	Entute
Aŭstrio	820	54	65	57	976
Ameriko Centra	52	3	5	2	62
„ Norda	125	7	16	4	152
„ Suda	615	42	210	27	892
Aŭstralio	51	3	6	2	62
Azio	75	8	12	3	98
Belgio	115	18	48	15	194
Bulgarujo	75	5	16	6	100
Cehoslovakio	484	97	614	42	1237
Danujo	15	4	9	3	31
Danzig	45	2	12	2	59
Estonio	96	7	13	3	119
Finlando	26	4	9	2	41
Francujo	158	9	110	9	266
Germanujo	3944	62	477	26	4509
Grand-Britujo	186	11	17	8	222
Hispanujo	178	41	61	12	292
Hungarujo	236	32	35	5	308
Italujo	183	27	78	9	297
Jugoslavio	156	36	164	7	343
Latvio	52	5	8	2	67
Litovio	274	9	26	5	314
Nederlando	564	7	58	4	633
Norvegujo	39	3	11	2	55
Polujo	178	5	35	5	221
Rumanujo	47	6	11	5	69
Rusujo	57	2	3	1	63
Saar-ter.	20	1	5	1	27
Svedujo	25	3	8	2	38
Svislando	991	6	298	7	1302
Entute:	9,848	501	2,445	275	13,072

Favora decido de Glavpolitprosvet de tatara respubliko.

Nia konata aktiva samideano en tatara respubliko s-o Frank, sekretario de Kazana Esperanto Societo, sendis al ni tradukon de eltiraĵo el protokolo de Glavpolitprosvet de tatara respubliko. Klariĝante ni aldonas, ke tiu ĉi institucio en soveta registar-sistemo ludas la rolon kiel la ministerio de klerigo en aliaj landoj kun subfakoj diversaj por la spirita vivo.

Al Kazana Esperantista Societo.

Elitiraĵo el protokolo N° 14.

Kunsido de prezidantaro de Glavpolitprosvet (ĉefa politiko-kleriga institucio) de Tatara Respubliko de 30 majo, 1924-a jaro.

Oni decidis:

Oni aŭskultis:
§ 4. Pri kunligo de Esperantista Societo kun „Glavpolitprosvet“.

Raportas vicprezidanto de Esp. Societo: Avdew

No. 106 j.

7. VI. 1924

Subskribis:

Prezidanto Kasakov
Sekretario Kasiljev.

Por akurateco de eltiraĵo: Sekretario de Kolegio de Glavpolitprosvet (Subskribo).

(Sigelo.)

Tradukis sekretario de Kaz. Esp. Societo
H. Frank.

UEA bezonas dekmil anojn! Aliĝu!

Telegramo el Wien:

Prezidanto de Respubliko Aŭstrio D-o M. Hainisch, honora protektanto de la Deksesa. Instrua ministro D-o Schneider, membro de l' honora prezidantaro de la kongreso. Okazos inaŭguro de memortabulo por Zamenhof en ĉeesto de la tuta familio. Detaloj sekvos.

La VI. Hungarlanda Kongreso.

Ĉu la Dekoka 1926 en Budapeŝto!

Dum la du pentekostaj tagoj okazis en la urbeo Szombathely sur la okcidenta landlimo de Hungarlando la VI-a landa kongreso. Kvankam la tiea grupo estas nur malforta kaj la Esperanto-movado floras tie nur de du jaroj, la kongreso sukcesis tre bone, pli bone, ol oni atendis.

Apartan intereson donis al la kongreso, ke Szombathely estas la sola urbo en Hungarlando, kie estas ldo-movado, ĉar mezlerneja instruisto diligente propagandas ldon kaj provizis kelkajn lernantojn per la blua ldo-insigno. Ili promenis sur la strato, sed embarasite silentis, kiam iu fremda esperantisto alparolis ilin en ldo. La kongreso pruvis la nekompareblan superecon kaj gravecon de Esperanto apud ĉiuj aliaj mondlingvo-projektoj.

Dimanĉe matene estis en la Sankt-Mihaelo-kapelo silenta meso, kiam P. Egyed Glasits, ordenestro de Vasvár, diris la sanktan parolon. Li parolis nur la unuan fojon Esperante, sed tre bele kaj kun bona akcento. La kongreso kunsidis en la urbdoma ĉambrego. Prezidanto fariĝis la loka prezidanto D-o Géza Halmágyi. Honor-prezidanto pens. generalo Rupprecht Jobst, unu el la protektantoj. Protektanto estis ankaŭ la urbestro kaj la episkopo de la urbo. En nomo de la urbo parolis konsilanto D-o Horváth, kiu promesis influate per sukceso de la kongreso mem lerni nian lingvon. 41 urboj estis reprezentitaj. Post la salutparoloj kaj saluttelegramoj, kelkaj ankaŭ el eksterlandaj esperantaj urboj, inter ili de prof. Cart, de Esperanto Triumfonta, de la L. K. K. de Wien, kaj de samideanoj el Slovakio, kiuj reprezentis 6 personojn, oni aŭdis la raportojn de la landa societo, de la instituto, de UEA kaj de la konferenco de Genève. Dum la laborkun-sidoj oni akceptis multajn gravajn decidojn. Inter alie oni alvokis la ministerion de eksteraj aferoj helpi la inviton de la XVIII. Universala Kongreso en 1926 al Budapeŝto! Oni petis de la ministerio de instruado enkonduki Esp. nedevige en mezlernejojn kaj komercajn lernejojn, de la poŝtdirek-cio permeson de Esperanto en poŝtista kurso, en poŝticejoj, en radioparoladoj, en telegrafado, de diversaj institucioj kaj de la gazetaro la konstantan helpon al nia movado.

La kongreso aŭdinte la raportojn de la kon-ferenco de Genève gratulas al ties aranĝintoj kaj partoprenintoj por la sukcesa laboro kaj subtenas la ideon daŭrigi tiajn fakkonferencojn kun samtempaj teknikaj konferencoj ekster la tempo de la universala kongresoj.

La kongreso rekonante la nebran neceson kaj ĉefan gravecon de bone funkcia UEA alvokas al ĝenerala propagando pro UEA kaj petas la esperantistojn ĉiuforte helpi al UEA, kun kies delegitoj la grupoj agu konkorde.

La kongreso ankaŭ rezolucis efektiviĝi ĉie la komercan eksperimenton, subteni la radio-mova-don, pli forte konigi al la novaj esperantistoj la historion kaj nunan organizon de nia movado kaj proponis, kiel plej taŭgan propagandilon, en publikaj lokoj ĉiam paroli Esperanton kaj videble porti la insignon.

Neatendite bone sukcesis la bankedo kaj la vespera koncerto kun danco, kiam ankaŭ eminentuloj partoprenis. La koncerton aranĝis Julio Baghy. Oni ludis la teatraĵon „Solcaj animoj“ kaj kelkajn belajn koncertaĵojn. En la kulturdomo estis ekspozicio kaj tie parolis Baghy kaj Bal-kányi pri idealaj kaj praktikaj celoj kaj sukcesoj de Esperanto, kio faris bonegan impreson. La duan tagon estis ĝeneralkunsido de la Landa Societo. La sekvonta kongreso okazos en Buda-pest, se nur la provinca urbo ĝustatempe ne in-vitos ĝin. Posttagmeze estis en apartaj vagonoj agrabla ekskurso al urbeo Kőszeg. — La lokaj gazetoj detale raportis pri la kongreso.

La kongreso aliris la ĝeneralan atenton de Szombathely kaj parte ankaŭ de la tuta lando al Esperanto kaj ebligis atentigi la oficialajn rodojn pri niaj deziroj kaj agadoj.

Rimarko: Ni petas pardonon, ke ni ne havas lokon enpresi la nomaron de ĉiuj personoj, kiuj per paroloj aŭ laboroj helpis la sukceson de tiu ĉi kongreso. La red.

Sekretarioj, raportantoj!

Se vi deziras nepre, ke aperu viaj raportoj kaj informoj, skribu kiel plej eble **resumel** Lastatempe ni devis pro troa materialo flankenlasi multajn kelkfoje eĉ gravajn sciigojn.

Sendu kompletan manuskripton!

La Deksesa.

Teatra prezentado „Ginevra“.

Surprizo por la kongresanoj estos la teatra prezento de lirika dramo de D-o Privat „Ginevra“, originale verkita en Esperanto en versoj. Ĝi estis unufoje ludita en Bern ĉe la naŭa Kongreso en 1915. Tiam prezentiĝis de la famaj flandraj aktoroj de la Reĝa Teatro en Antwerpen. En Wien ĝin prezentos s-o Julio Baghy, la konata poeto kaj aktoro, kun sia kolegaro de „Literatura Mondo“, kun la deziro plikonigi nian originalan esperantan poezion.



S-o Herriot,

Franca ministrara prezidanto kaj ministro de eksteraj aferoj.

Antaŭ proksimume unu jaro ni povis informi pri la favoro de tiama deputito s-o Herriot de Lyon por Esperanto. Intertempe s-o Herriot fariĝis ministrara prezidanto kaj ministro por eksteraj aferoj en la nova franca registaro. Ni ne esperas malpli ol siatempe, ke s-o Herriot konservas al ni sian favoron por nia afero.

Radio.

Radio-lecionoj en Frankfurt a. M.

La direkco de la stacio de Frankfurt donis la permeson por esp. lecionoj. Per tio la stacio dumĝise decidis por Esperanto. La 4 julio 1924 ĥoro s-o Schukowski, prezidanto de la grupo de Frankfurt, komencos radio-kurson de Esperanto. Gratulante pro tiu ĉi sukceso ni deziras, ke kiom plej eble multe da personoj profitu de tiu ĉi kurso. Interesatoj turnu sin al la stacio. Samideanoj en la aŭdebla sfero de Frankfurt varbu partoprenantojn. Eksterlandaj samideanoj, kiuj aŭdas la stacion, estas petataj skribe informi la stacion pri la rezultato. Adreso: S-o Direktoro D-o Flesch, Südwestdeutsche Rundfunkdienst A.G., Elbestrasse 50, Frankfurt a. M. (Ilustr. kartoj rifuzataj!)

Radio-disaŭdigo de Kōbenhavn.

El la nova radio-stacio „Ryvang Radio“ en Kōbenhavn (Kopenhaga ondolongeco: 1050 m) ni disaŭdigas kantojn kaj paroladojn je proksima lundo, 30 junio je 20 h. (MEH). F-ino M. Noll parolas pri Esperanto, poste salutoj en Esperanto la samideanojn en eksterlando.

Aŭdintoj bonvolu sendi poŝtkarton al Radio-stationen Ryvangen, Kopenhago pro la distanco kaj ankaŭ, ĉar tiu stacio intencas Radio-disaŭdigi esperantan kurson ĉiusemajne, se vi instigos tion.

P. Lendorff.

Bonaj perspektivoj por Radio en Polujo.

Fine ankaŭ en Polujo Radio estas permesita. La speciala leĝo aperos en aŭgusto. La inter-esiĝo ĉie je radio estas grandega, kaj ĉiufanke oni riproĉis al la pola registaro ĝian ĝisnunan sintendadon kontraŭradian. Ricevilojn povos aranĝi ĉiu, dume la nombro de sendiloj estos limigita. Koncesion por ĉi lerta ricevis la „Poli-teknikaĵo Varsovia“ kaj diversaj institucioj kaj societoj en kelkaj aliaj urboj. La aranĝotaj ricevstacioj plej multe similas al la franca sistemo. Jam nun klopodas kelkaj s-anoj aranĝi, se eble, ankaŭ paroladojn en Esperanto.

Pola Esperanto Servo, Bydgoszcz.

Esperanto-lecionoj de Breslaŭ.

Oni ĵus informis nin, ke konforme al la decido de radio-konferenco de Genève ankaŭ en Breslaŭ komencis radio-kurso por Esperanto lundo 23.6 Kurso ĉiulunde 19.30–20.15 h., ondolongeco 415 m.

UEPL. — Sekcio Aŭstrujo

Aŭstra Pacifista Esperantista Societo.

INVITO

al „Pacifista Kunsido“ en la kadro de nia XVI-a (6–14 aŭg. 1924) en Wien.

La „Aŭstra Pacifista Esperantista Societo“ kiu, laŭ intenco de nia mortinta prezidanto D-o Giesswein ĝis aŭgusto por la „Pacifista konferenco“, okazonta dum la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto, gvidas la aferojn de la en Nürnberg dum nia XV-a fondita „Universala Esperantista Pacifista Ligo“, forsendas kiel „Organiza Komitato“ de la „Pacif. Konf.“ tiun specialan inviton al ĉiuj ĉefkomisiitoj t. e. ĉefdelegitoj de UEPL (vidu en ET 153 kaj 158!), al la UEA-(ĉef-) delegitoj de la ĉefurboj de ĉiuj landoj sur la tuta ter-globo, al ĉiuj E-gazetoj, al la E-centra-organizo-j de ĉiuj landoj ktp., por ke la „Pacifista Kunsido“ fariĝu efektive grava paŝo antaŭen!

Ni petas ĉiujn, legu ĉiam „Esperanto Triumfonta“, kiu gazeto kiel semajna komu-nikilo tre rapide povas sciigi la tuimondan esperantistaron pri ĉiuj okazint- kaj okazotaj. ET estas al nia altvalora pacideco tre favora kaj subtenas nian laboron tute neŭtrale ĉiokaze.

Gravaj novaj sciigoj.

1. La Protektorato por la „Pacifista Kunsido“ akceptis afable kaj tre volonte Lia Dekana Moŝto de la Wien'a filozofa universitat-fakultato Prof. D-o Franz Suess, kiu el sia somerresladejo venos al Wien speciale por nia konferenco, por per-sonale saluti la konferencanojn.

2. Ĉefparolados dum la „Pacifista Manifestacio“ nia kara kaj tre ŝata Esperanto-ĉef-pioniro D-o Edmond Privat el Genève.

3. La eminenta burgaktoro (de la famkonata iama imperiestra „korteĝa teatro“) Philipp von Zeska, kiu ankaŭ ludas en la kongres-teatraĵo, deklamas dum la „Pacifista Manifestacio“ unu el la plej belaj poeziaĵoj de nia Majstro nome „La Preĝo sub la Verda Standardo“, kiu pro sia altvalora porpaca enhavo trege taŭgas por la ĉefkunveno de la „Universala Esp. Pacif. Ligo“

La „Preĝo“ estu nia danko al la memoro de nia mortinta Majstro kaj ankaŭ al lia kara edzino, kiu estas ja la honorprezidantino de nia „Ligo“! Al ŝi vere ĉiuj esperantistoj ŝuldas grandan dankon, ĉar nur per sia helpo la Majstro povis plenumi sian verkon kaj ankaŭ ni nun povas labori por la paco per nia mirinda Esperanto! Esperantistoj, venu do grandamase, por danki al nia honorprezidantino!

Laŭ interkonsento kun la LKK niaj kunveno estos jenaj:

Ĵaŭde, 7 aŭgusto, Libera antaŭinterparolado (de la estintaj kaj estontaj estraranoj).

Vendrede, 8 aŭg., 1. Laborkunsido (verŝajne antaŭtagmeze).

Sabate, 9 aŭg., Pacifista Manifestacio (verŝajne posttagmeze).

Lunde, 11 aŭg., 2. Laborkunsido.

La preciza horo pli poste en „Esperanto Triumfonta“. (Ni intencis aranĝi la 2-an laborkunsidon tuj post la „Pacifista Manifestacio“, por ke la kongresanoj havu pli da libera tempo dum la sekvontaj tagoj. Sed ĉar la „Pacifista Kunsido“ laŭ la ĝis nun jam ricevitaj sciigoj fariĝos unu el la plej gravaj fakkonferencoj de nia XVI-a, ni devas eluzi la eblon „kunlabori“ per aparta 2-a laborkunsido. Krome la impresoj de tute sola kaj aparta „Pacifista Manifestacio“ estos multe pli bonaj por ĉiuj ĉeestantoj.) Tuj post la 2-a laborkunsido okazos flanke de la „Aŭstra Pacifista Esperantista Societo“ mallonge daŭra kunsido de la Aŭstraj Esperantistaj Pacifistoj (esperant- aŭ laŭ deziro germanlingve) pro kunigo de la aŭstraj fortoj rilate nia esperantista pacifista movado.

Al la ekstereŭropanoj ni forsendos tiun „Inviton“ ĉefe ne kiel „Inviton al la XVI-a“ (ĉar nur malmultaj ja povas veni), sed kiel „Inviton al afabla kunlaboro“.

Tre estimataj ekstereŭropaj gesamideanoj!

Bonvolu esti kun ni en skriba kontakto aŭ per nia komunikilo „Esperanto Triumfonta“! Ni petas vin, aliĝu al nia Ligo, fondu „Grupon“ aŭ „Societon“, preparu la proksiman kunsidon aŭ „Kongreson de UEPL 1925“, subtenu nin per kunlaboro kaj laŭeble per mono, por ke la centro de la tutmonda esperantista pacifista movado povu labori sukcesplene! Tre granda kaj ampleksa estas la kampo de nia laboro!

„Organiza Komitato“ de la „Pacifista Kunsido“.

R. M. Frey,

prez. de A. P. E. S.

Wien, III., Becherbasse Nr. 14.

Kroniko.

Por servi nian legatanojn per ĉiam aktuala, fidinde kaj kompleta informaro, ni bezonas scilgojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administratistoj aŭ privataj scilgoj) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Ameriko.

Usono.

Cambridge, Mass., Usono. La 31 majo kunvenis ĉe s-o N. W. Frost la Bostona Esperanto Societo. Ĉeestis 55 anoj kaj gastoj en ĝardeno (priskribita en House Beautiful, juna numero). Kelkaj vizitis helmon de Longfellow. Post temego ĉe 6.30, afera kunveno. F. lino Meriam, sekretario de E.A.N.A., instigis al kongreso je Arden, Delaware, je 7 julio. Oni preparis propagandon ĉe radiistoj kaj komercistoj.

Azio.

Armenio.

S-o G. Sevat, fininte siajn studojn, komencos vigan propagandon en sia hejmlando. Samideanoj, kiuj komprenas la valoron de propagando, estas petataj subteni lin per efika propaganda materialo. Provizora adreso ankoraŭ: G. Sevat, Nikolajevskaja 56, Tiflis (Georgio).

Turkujo.

Konia, S-o Sidki Hanĉarlı malfermis Esp. kurson, je kiu partoprenas ankaŭ instruistoj.

Eŭropo.

Aŭstrio.

Esperanto Manifestacio en Wien.

Sabato, la 31 majo arangis la „Libera Esperantista Laborokomunumo“ en la festivalono de la magistrato por la IX-a distrikto „Esperanto manifestacio“, je kiu partoprenis ĉirkaŭ 500 personoj, inter ili multaj necesperantistoj. La festkunskidon prezidis s-o W. Smilaj, la prezidanto de la Wien-a Esperanto Delegitaro. La ĉefparolado faris s-o Prof. O. Simon, pri la kultura valoro de Esperanto kongresoj. Gos-oj Krizkova kaj Weingast deklamis originalajn Esp.-poemojn kun germanaj tradukoj. Post la esp. finparolado de s-o Prof. D-o H. Jokl manifestparolis 9 diversnaciaj samideanoj. Dudeko de ĉeestantoj aliĝis al esp. kurso.

Granda sukceso de esperantistaj bankoficistoj en Wien.

La Wien-a esperantistaro denove atingis gravan sukceson. Antaŭ duonjaro komencis kelkaj esp.-istoj bankoficistoj propagandi inter la kolegoj. La unua sukceso estis la fondo de „Grupo de Esperantistaj Bankoficistoj“ en Wien kaj per ĝia influo aperigi presperantajn artikolojn en pluraj fakgazetoj. La plej ĉefa tasko de la grupo estis la inda arango de la unua konferenco de esp.-istaj bankoficistoj dum la XVI-a U.E.K.; pro tio reprezentantoj de la grupo vizitis la estraron de la sindikato por peti ilia subtenon je la antaŭlaboroj. La sekretario de la sindikato informis sin detale pri la celo kaj valoro de Esp. por la bankoficistoj kaj deklaris, ke ne nur la festivalono estos je dispono de la konferenco, sed ke la estraro mem estas preta kunvoki kaj arangi ĉi tiun gravan konferencon. Se oni konscias, ke la sindikato reprezentas pli ol 25000 oficistojn el tuta Aŭstrio, kaj pro tio estas la plej potenca kaj riĉa sindikato oficista de la mondo, estas klara, kian gravan valoron ĉi tiu konferenco havos.

Estas la unua okazo, ke tia grava asocio aranĝas internacian konferencon, kiel sola konferenclingvo estos Esperanto.

La plena sukceso de la konferenco dependas nun de la multmembra partopreno de la eksterlandaj gekolegoj, kiuj tuj anoncis sian partoprenon aŭ nepre sendu siajn proponojn al la Asocio de Aŭstrijaj Bank- & Sparkasoficistoj Wien, L. Löwelsstrasse 18.

Belgiujo.

Antwerpen. — En la automobilfabrikejoj „Minerva“ en Antwerpen komencis 17. 6. 24 la unua Esperanto-kurso por la laboristoj kaj oficistoj. La kurson gvidas s-o Remi Van Eynde.

Ĉeĥoslovakio.

Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio, centro Píseň, arangis 1 junio la ekskurson al la ruino Rábi ĉe la okazo 500 jara rememoro de la morto de Jan Žižka el Trocnov la glora armeestro en Husidaj militoj. Ĉe ruino Rábi s-o Pech faris paroladon pri Žižka antaŭ 500 partoprenantoj.

Post parolado sekvis la ekskurso en ĉirkaŭaĵoj. La kurso por komercantoj, kiuj ius finigis sub gvido de kamarado Pešek, kaj el kiuj aliĝis 16 samideanoj deziras korespondadi kun samideanoj el la tuta mondo. Adresojn anoncu al supre nomita L. L. E.

Praha. La 15 junio okazis en Praha la geedziĝo de la filino de nia mortinta pioniro je Esperanto en Ĉeĥoslovakio Prof. D-o Siegfried Lederer, la tiama eldoninto de „Ĉirkaŭ la mondo“ kaj „Universo“, kaj la filo de gesamideano D-o Otto kaj Rudi Heller el Praha. (Ni gratulas, Red.)

Francujo.

Perpignan. — S-oj Victor Dalbiez, Pierre Ramell, Jean Payre, nun deputitoj de nia departemento skribis al s-o Jean Lech, prezidanto de Perpignan'a „Amika Rondo“ ke ni povas esti certaj pri ilia absoluta konkurso pri la enkonduko de Esperanto en la lernejoj.

„Pacomo Esperantista Propaganda Oficejo“ (5 rue de la Savonnerie, Perpignan) daŭrigas sian propagandon precipe nun ĉe la radiistoj (Multaj propagandaj artikoloj aperis en la regiona gazeto).

„Amika Rondo“ organizas dum somero kelkajn promenadojn en la kamparo.

René Lech, Ĉefsekretario.

Germanujo.

Frankfurt a.M. La propagando-laboro estas viga S-o Schulowski komencos radiokurson la 2. 7. Okaze de radio-parolado de redaktoro Kreuz de ET okazis Esperanto-ekspozicio en konata filatelieja entrepreno Harder, Gr. Bockenheimerstraße 53. Samtempe la eldonistoj de Nitti-libro faris specialan ekspozicion en sia magazeno, mezle lokate de la urbo. Okaze de la komenco de radiokurso nova ekspozicio estos farata en unu el la plej grandaj libroj en centro de la urbo.

Bad Kreuznach: la l. gr. komencis kursojn por infanoj inter 10 ĝis 14 jarojn kun 11 partoprenantoj.

Hungarujo.

Sukceso ĉe la Budapeŝta Foiro.

Nunjare Merkurio ekonomia fakgrupo de la Hungarlanda Esp. Soc. arangis en tri diversaj lokoj de la Budapeŝta Foiro, ĉi tiu ĝenerala, kiel en la grafika parto

esp. ekspozicion kaj ĉe la ĉefenirejo apud aparta esp. tablo konstante deĵoris dum la tuta tago esperantistoj — kelkfoje farante paroladon al la publiko. La rezulto ne mankis: pli ol 150 anoncis sin ĉe la foiro por kursoj. Ankaŭ la kunvenoj de la Merkurio en Kafeo „Central“ (Egyetem-u.) ĉiumerkrede inter la 6—8 h. tre vigligris.

P. B.

„Sportfako de Hungara Esperantista Societo Laborista“ fondigis la 26 junio por disvastigi Esperanton inter la laboristoj sportistoj, respektive disvastigi la sporton inter la lab. esperantistoj. La Sportfako petas la interrilaton de similaj fakoj eksterlandaj. Adreso: Sportfako de „H. E. S. L.“ VII. Dohangstr 71. I. Budapest.

Ĉeĥoslovaka Esperanta Insituito:

UEA sekcio de ĈEI en Praha arangis en insituito la 31 majo 1 Amikan kunvenon de UEA-anoj de Praha, vizilitan de 50 UEA-anoj ĉeĥaj kaj germanaj. Ĉefa punkto de la programo estis lumbilda propaganda parolado pri UEA de ĉefdelegito s-o O. Klenka, kiu priskribinte la historion de UEA entuziasme rekomendis al la ĉeestintoj subteni morale kaj finance UEA, kies sukceso kaj venko estos ankaŭ venko de la tutmonda esperantistaro. Krome la programon partoprenis: Čánský, Pílik, Šustř kaj la kvininto esperantista de s-o Petr, kiu ludis esperantajn komponaĵojn. La 28. 5. kaj 11. 6. kunvenis en insituito la lernantoj kaj absolventoj de la „Privata Esp. Lernejo“ de ĈEI, por per amuza programo pliperfektiĝadi en Esperanto. La kunvenoj farigis daira monata entrepreno esperantista. — ĈEI partoprenis oficiale la Ĉeĥoslovakian kongreson en Liberec-Reichenberg, kie ĝia prezidanto s-o Pílik prezentis raportojn pri la ĝisnuna agado de ĈEI kaj ĝia programo. — Ĉe ĈEI fondiĝis sekcio de ŝtate ekzamenitaj esperantaj instruistoj, el kiuj aliĝis el la ĝis nun ekzamenitaj (32) iam 26 ĉeĥaj esperantistoj. La sekcio kunlaboros rilate al la enkonduko de esp. en la lernejoj kun la ĵus fondita germana klubo de la ŝtate ekzamenitaj germanaj esp. instruistoj.

Tra la Esperanto-Literaturo

Ein Führer durch das Esperanto-Schrifttum!

Jus aperis kajero 1-a de ĉi tiu nova literatura informilo. Postulu tuj specimen numeron, se vi bezonas Esperantajn!

Esperanto-Verlag
Friedrich Ader, Dresden-A 27
Bamberger Str. 43 A

Nederlandaj Esperantistoj!

Ne forgesu vian devon **aboni** la Nederlandan Esperanto-gazeton
Holanda Esperantisto.

Ĝi enhavas: Literaturon, Ekzercubrikojn por komercantoj kaj progresintoj, Demandaron kaj ĉiujn ajn aktualaĵojn

Petu specimenon de la Administracio:

Hazekamp 20 Zutphen.

La plej malmultekosta libro en Esperanto

Ĉiu devas nepre posedi la libron

Eŭropo

ĉe la abismo

de

Francesco Nitti

iam ministro prezidanto itala

Esperanto-traduko

kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

(Presita 200 paĝoj.)

Jus aperis.

Prezo 4 sv. fk.

Mendu tuj!

La libro al privatpersonoj okazos nur post antaŭa pago de la sumo de 4 sv. fk. plus sendokso de 25 c. or-fenigoj po ekzemplero, pagebila en la valuto de la koncerna lando, transkalkulita je la kurso de la borsot de Zürich (Revendistoj tuj sin pro specialaj kondiĉoj al la eldonejo)

Frankfurter Societäts-Druckerei

G. m. b. H.

Abt. Buchverlag - Frankfurt a.M.

Korespondi en Esperanto. — Ilustritaj kartoj rifuzataj.

Legu la libron:

Mifionoj da homoj nun vivantaj neniam mortos!

Ĉiu vera esperantisto estas idealistoj! Ĉi tiu nepre devas posedi ĉi tiu libron, laŭ kies enhavo la plej ideala ora epoko de la homaro estas en krepusko dum la nuna kiza stato de la mondo, kiu estos arkivata de la plej bonaj kaj plej favoraj imagaj elkonstencioj sur la tero. Ĉi tiu klarigoj bazas sur la Biblio, kaj ĝiaj paroloj por la Regno de Dio sur la tero. — Prezo 1.25 sv. fk. aŭ 1. — or. mk. — Mendu ĉe

Garda Turo, Biblio- kaj Traktat-Societo,
Esperanta Fako,
Landstr. 277.
Rieden bei Baden, Svislando.

Postŝekkontoj:
Araŭ VI, 1905,
Karlsruhe 7/236.

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, flantiĝo, edziĝo, morto, okazintaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. a.) sen page.

Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimume da sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Anoncetoj ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la aboninto, ĝuas por ĉiuj anoncetoj preferan prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 3. — mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

MORTO. En Budapeŝt mortis la 29 majo Antonio de Zsigmond de Zsigmondhara, del. de UEA, post longa malsanado. [1]

POPULAR-SCIENCIA VERKISTO! Ni decidis aperigi malgrandajn popularsciencajn verkojn: havante manuskriptojn bonvolu vin turni al Eldonejo „Esperantista Voĉo“, (pos. Salo Grenkamp-Kornfeld) Jaslo, Polujo. [2]

BONA KAJ NOBLA FAMILIO EN TIRNOVO. Bulgarujo, deziras dungi servistojn kiuj scias kudri kaj bone kuiru. Oni preferas hungaran aŭ germanan fraŭlinojn. La dezirantoj okupi tiun ĉi oficon skribu je adreso: Ivan G. Nikolov, fotografisto, Tirnovo, Bulgarujo. [2]

SAMIDEANOJ TUTMONDAJ HELPU! Por arangi en nia loko esperantan ekspozicion ni bezonas esperantajn kiujn ein. Redakcioj tutmondaj sendu al ni 2 numerojn de ĉiu gazeto, kiujn ni, dezirinte, pagas. Samideanoj, se vi helpas, ni sukcesos. Sendu al: Beverwijka Laborista Esperantista Grupo „Fraterco“ Ossumburgstr. 18, Beverwijk ij Haarlem, Holando. [3]

NUR 3 sv. fk. ENSENDU kaj vi ricevos 120 diversajn po-lajn poŝtmarkojn. Ni forsendas ankaŭ pm. elekton post ricevo de plej bona referenco aŭ mundepono, Eldonejo „Esperantista Voĉo“, Jaslo (Polujo). [1]

ELDONEJO „ESPERANTISTA VOĈO“. Jaslo (Polujo) posedanto: Salo Grenkamp-Kornfeld, liveras ĉiujn esperantajn librojn ktp. Postulu prezaron. [1]

Korespondado kaj Interŝanĝo.

Deziras interŝanĝi kun XVI-a kongresintoj pri spertoj faritaj je propagando-ekspozicioj, petas jam nun doni informojn, statistikojn ktp., dankas antaŭe por alsendata ekspozimaterialo. Th. Kuitzi, Esperanto-Libreo, St. Gallen-O., Svislando. [2]

Fino Madeline De Ruyscher, Groote Markt 15, Lokeren (Belgiujo), deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. poŝtkartoj. [2]

Membroj de Soc. Esp. Gr. „Nia Ideo“, Antwerpen, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj, precipe pri laborista movado, Respondo certa. Skribu al sekr.: A. Van Kerckhoven, 22 Korte Ypermanstr., Antwerpen (Belgiujo). [2]

S-o Georgi Z. Atanasov, ulica „Carŝia“ n-o 48, Petriĉ, Bulgarujo, deziras korespondi kun ĉiuj gesamideanoj el la tuta mondo per letero kaj il. pk. [2]

Mi scigas ĉiujn, kiuj konis min sub pseŭdonimo Edvardo Lonkopolski ke mi ne uzas plu la pseŭdonimon. Edvardo de Wiesenfeld, Biala 3, Warszawa (Polujo). [1]

S-o Carl Falk, oficisto, Miłtweida-Markersbach i. Erzgeb., Germanujo, deziras korespondi per il. pk. 1. kaj interŝanĝi PM. kun la tuta mondo. [2]

Josef Klug, Niederhermannseifen, 14, apud Arnau, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kaj interŝanĝi il. poŝtkartojn, leterojn kaj PM. kun la tuta mondo. Se oni sendos il. poŝtkartojn, oni donu la afrankon en diversaj poŝtmarkoj por propagando. [2]

Mi deziras korespondi kun 14-15-jaraj studentinoj de mezlernejoj. F-lino Henriette Werner, Wien XVII, Schutthessgasse 5/19, Aŭstrio. [5]

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo, precipe kun kolektantoj rustandaj. Giustino Sciarretta, Termoli (Italio). [2]

S-o Francisko Dudas, polioficisto, Szerb-utca 5, II, deziras ricevi el kiu ajn lando 100—200 diversajn poŝtmarkojn nedifektajn kaj neperforitajn kontraŭ samkvanto. [2]

Kontraŭ 2 sv. fk. aŭ egala valoro 10 divers. franc. kaj litov. Memelpoŝt, kaj 20 divers. germ. pm. Fritz Zyleit, Lyck, Ostpr., Germanujo. [2]

F-lino Mario Feenyevs, Drzenice, pp. Batoŭce, župa Zvolenská XVIII., Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun tutmondaj esperantistoj. Tuj respondos. [2]

Pri homaranismo laŭ Zamenhof deziras korespondi kaj diversajn ĉiutemajn artikolojn, broŝurojn k. a. kolektas kaj eventuale interŝanĝas. V. Echnier, Praha II-1642, Halkova 7, Ĉeĥoslovakio. [2]

S-o Jozefo Schwarz, 23 jara, Sabinovska str. 55, Prešov, Ĉeĥoslovakio, serĉas agrablajn interrilatojn, preferi kun f-linoj per il. PK kaj L. Petas nepre kaj tuj sendi foto-grafajn. [2]

S-o V. A. Lugovoj, Sučan-Rudnik, Primorskoj gub., Skola II st., Orienta Siberio, Rusujo, kolektas papilionojn, skaraŭrojn k. a. insektojn de Ussuria regiono; deziras korespondi kun amatoroj-entomologoj ĉiujlandaj kaj interŝanĝi kolektaĵojn. [1]

Dudekjara fraŭlo deziras korespondi per il. PK kun tutmondaj fraŭloj. Skribu al s-o Alois Reithofer, Landstr. 22/10, Hainburg, Aŭstrio. [1]

Mi deziras interŝanĝi PM kun Turkujo, Balkanŝtatoj, Jugoslavio, Aŭstrio, Polujo, Rusujo, Estonio, Latvio, Litovio, Finnlando, Italujo kaj ekstereŭropaj ŝtatoj. Mi permesos al seriozaj sendaĵoj de minimume 100 ekzempleroj. Laŭdeziro mi resendos laŭ katalogo Yvert kaj Tellier. Adreso: W. L. F. van der Have, Gaelestrat 6, Haarlem, Nederlando. [1]